Justinus Kerner,

Malnovaj sonoj

tradukita de Manfred Retzlaff

Birdkanto vin ravigas,
Ho kor', aŭdante ĝin.
Ĉu tio ne eligas
el la koŝmaro vin?

Mi aŭdas sonojn ĉiam.
Min memorigas ĝi
Je l' olda tempo, kiam
La mondon fidis mi.

Ne helpos herb' saniga,
Malsanas mi kaj el
Ĉi tiu songĝ' timiga
Min vekos nur anĝel'.

Traduko de la Germana poemo "Alte Laute" de Justinus Kerner *(∗1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2014-12.*

Arg-1107-2234 (2014-12-31 17:57:30)